

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

NIAJ PLANOJ

sept. 2: Prezento de spertoj (ĉe nia Muzeo)

Estos okazo por niaj membroj prezenti sian sperton en tiu ĉi jaro, per Esperanto. Oni povas uzi, de kelkaj ĝis maksimume 30 minutoj, kun aŭ sen bildoj el komputila ekrano.

sept. 9: Vizitos nin Maĉida-anoj

Urbo Maĉida, urbo proksime al Jokohamo, havas viglan rondon nomatan Esperanto-klubo de Maĉida.

Ties ĉefaj membroj planas viziti nian muzeon.

Kompletigo Serio Oriento-Okcidento ĉe ni

“Serio Oriento-Okcidento” estas libroserio de la monde famaj literaturaĵoj, en bona traduko Esperanten. Nia muzeo kolektas ilin, kaj baldaŭ ĉiuj titoloj (sesdek kaj kelkaj) estos finkolektitaj en nia muzeo, dank’ al bonvolaj donacintoj. Ili estas ekspoziciataj en la speciala librobreto.

La 128-a Legokunsido

En la 2a de julio 2023 okazis la 128-a legokunsido por libere elektitaj libroj. Partoprenis 4.

Longa historio inter Francujo kaj Germanujo “Kiel akvo de l’ Rivero” de Raymond Schwartz

Mizro Iwaya

Mi estis, antaŭ ĉio, interesita de ĝia longeco. La tuta libro havas pli ol 480 paĝojn. Mi supozas ke ĝi estas la plej longa romano verkita en Esperanto. La enhavo estas drasta historio de la geamantoj Pierre, franco, kaj Annemarie, germanino en la epoko de la du grandaj mondomilitoj. Tie Francio kaj Germanio batalis unu kontraŭ la alia, kaj sekve la du geamantoj havis severan sorton dum tiuj 35 jaroj.

La sceno komenciĝas en francaj urboj Voiron kaj Autrecourt apud la landolimo kun Germanio en la jaro 1913. Tie okazis nupta ceremonio de nova paro. Ĉeestis frato de la novedzo, kies nomo estas Pierre Touchard. Li baldaŭ ekveturis al germana ĉefurbo Berlino kiel instruisto de

la franca lingvo. Tie li ekloĝis en la domo de ges-roj Geist. Ĝi situis proksime al lia nova laborejo, t.e. lernejo de Dir. Vogel. Ges-roj Geist havis filinon nomatan Lotte. Ŝi havis tri intimajn amikinojn. Unu el ili estis nomata Annemarie. Ili interamikiĝis, kaj tiamaniere pasis unu jaro. La unua mondomilito eksplodis subite kiam aŭstria ĉefduko Franz-Ferdinand falis sub la kuglo de juna serba fanatikulo. Kiam Pierre intencis reveni al sia hejmurbo en Francio, li trovis ke multaj fervojaj linioj estis fermitaj. Krome li ne povis sekure promenadi en la urbo, ĉar li apartenis al malamika ŝtato! Tiam Annemarie helpis lin. Ŝi kaŝis lin dum tagoj en sia hejmo ĝis li trovis taŭgan vagonaron kiu

iris "direkte" al Frankfurto. Lia vojaĝo zigzagis, sed finfine li sukcesis eskapi al Francio. (Ĉu vi memoras similan vojaĝon de Zamenhof, kiam li intencis partopreni en UK en Parizo en 1914?) Kiam finiĝis la milito li letere serĉis Annemarie, sed vane.

Malfeliĉe okazis la dua mondomilito en 1939. Germana armeo okupis ĉefan parton de Francio, kaj Pierre renkontis junan soldaton nomatan Hans. Pierre fuĝis al Malseille, kie li hazarde renkontis Annemarie kaj aŭdis ke Hans estas filo de Pierre kaj Annemarie! Tie entrudiĝis gestapanoj kaj arestis Annemarie. Ili estis refoje disdividitaj. Kiam finiĝis la milito, Pierre

sukcesis trovi Hans en iu kaptitejo. Pierre dungis lin kaj kune loĝis en la domo. Kiam ili aŭskultis radioaparaton, ili subite aŭdis pri sanktulino nomata Annemarie en Parizo. Fine ili sukcesis trovi ŝin. Post tio ili triope loĝis longe.

Tia estas skeleta historio de la romano. Ĝin legante, mi respertis drastan historion meze en Eŭropo. La historio estas sange ornamita de bataloj. Tie vivis kaj spiris homoj. La aŭtoro detale priskribis unu paron: franco kaj germanino. Tio samtempe reliefigis la historion de Eŭropo. Ĝi estas plena de tragedia sorto, sed legantoj certe korfaciliĝos kiam ili legos feliĉan rezulton de la geamantoj.

“Ĉinio Koreio Japanio” de Petr Chrdle

Sibayama Zyun'iti

Temas pri la vojaĝ-impresaro kun multaj fotoj, de ĉeĥo Petr Chrdle [petro ĥrdle], kiu vizitis kontinentan Ĉinion 1 fojon, Tajvanon 2 fojojn, 9 fojojn Koreion, pli da fojoj Japanion, en kelkdeko da jaroj – do aperas al mi karaj personoj kiel s-ro Kurisu Kei kaj s-ro Hirayama Tomohiro, jam forpasintaj. Se nur paroli pri Japanio, li ja vizitis multajn lokojn nekonatajn de mi, kvankam ankaŭ estas konataj lokoj kiel Minato-Mirai en Jokohamo.

Li intence komparas multajn aferojn, kun sia lando, kaj ankaŭ inter la tri landoj. Tial estis vidpunktoj freŝaj al ni, kvankam bone konataj: Pekina “Imperiestra Palaco” estas vasta kaj ĉien-irebla, ĉar jam ne estas imperiestro, dume Tokia “Imperiestra Palaco” – se temas pri turisme vizitebla spaco – malvasta, ĉar ankoraŭ vivas imperiestro.

Unu el la oftaj mirindaĵoj de alilandanoj estas, kiel titoliĝas sekcio “Ne estas necesejo kiel necesejo!”. Antaŭ ol miri pri aŭtomatigita sidejo, li miras pri aŭtomatigita klano, de kiu malsuprenvenas akvo por lavi manon, kaj ke tiu akvo malsupren iras al cisterno.

Nu, li vizitis tiujn landojn ofte kiel gvidanto de grupo (el Ĉeĥio kaj Germanio) por partopreni en Internacia Marŝado 50km-30km-10km, aŭ

alifoje kiel gvidanto de esperantistoj (aŭ ne). Tiaj epizodoj oftas en la libro, sed mi menciis nur unu, okaze de la 92a Universala Kongreso en Jokohamo en 2007. Mi persone okupiĝis pri la UK kiel LKK-ano, kaj tre zorgis pri iu junulo, kiu iris eksurse merkrede al Monto Fuĝi kaj tamen ne revenis ĝustatempe – li ja bone atingis la montosupron kaj poste sekure revenis. Sed mi tute ne konis la incidenton ĉe la grupo de Petr Chrdle. Li varbis grupon, kiu ekiris al Monto Fuĝi la sabaton, la fintagon de la UK, kaj ĉiuj celis nokte grimpi la monton, rigardis la sun-alvenon kaj revenis al Tokio, por dimanĉe forflugi de Narita... Sed tamen unu sinjoro ne revenis. Feliĉe tiu sinjoro, unu fojon erarinta la vojon, lastaminute aperis...

Ĉar li post dekoj da jaroj revizitis tiujn landojn, iuj aferoj montras progreson(?) de la aferoj ekzemple en Japanio: senhejmuloj, ludo paĉinko ktp.

Mi vidis titolpaĝon de la ĉeĥ-lingva libro, kun la sama foto. Do li eldonis ĝin ankaŭ ĉeĥe. Mi esperas ke la libro donos ŝancon, kaj al ĉeĥoj koni orientaziajn landojn, kaj al ni orientazianoj koni kion tipa eŭropano trovas ĉe ni, kaj similecon, kaj malsimilecon al Eŭropaj landoj, kaj malsimilecon inter la 3 landoj.

Notico

Forpasis s-ro Takahasi Tadao (84-jara), la 30an de junio 2023, pro malsano. Kondolencon al lia edzino, s-ino Takahasi Kimiko, ankaŭ nia membro.

novaĵo tradukita

Anstataŭigita ponto “Kōsoku Daishi-Bashi”

El la japanlingva Wikinews 高速大師橋の架け替え工事が始まる【2023年5月28日】

Tradukita de NAMBA Fumiharu

Ekde la 27a de majo 2023, komenciĝis konstruado anstataŭigi la ponton “Kōsoku Daishi-Bashi” (Ponto Daishi por aŭtoŝoseo) de Aŭtoŝoseo Shutoko (=Metropola-Rapida), kiu trairas la riveron Tama kaj ligas Tokian Metropolon kaj Gubernion Kanagawa.

Ekde la malfermiĝo de Kōsoku Daishi-Bashi je 1968, jam pasis ĉirkaŭ 60 jaroj. Pro la veturo de ĉirkaŭ 80 mil aŭtomobiloj tage, la malnoviĝo pluiras rapide, kaj jam troviĝas pli ol 1200 fendoj en la ponto.

La konstruado de ponto progresas laŭ jena metodo. Unue oni tranĉas ĝisnunan ponton kaj forprenas movante ĝin al direkto almonta. Poste oni glitigas novan ponton, kiun oni jam konstruis ĉe la alvala loko. Pretiginte la ponton antaŭ ol la anstataŭigo, oni povis ege mallongigi la periodon de konstruado, nome pli mallonge ol antaŭa anstataŭigo kiu bezonis longan tempon kelkjure.

Pro la konstruado, la partoj de la unua (Haneda) linio kaj aliaj linioj de Aŭtoŝoseo Shutoko estas fermitaj tuttage dum 2 semajnoj ekde la 27a de majo ĝis 10a de junio.

Oni antaŭsupozis, ke dum la semajnoj fermitaj de la konstruado, ne nur preskaŭ

ĉiuj linioj de Aŭtoŝoseo Shutoko, sed ankaŭ multaj ĉirkaŭaj vojoj okazos trafika ŝtopiĝo. La kompanio de Aŭtoŝoseo Shutoko anoncis peti kunlaboron por eviti la ŝtopiĝon, uzi publikajn trafikilojn, aŭ ĉirkaŭiri al aliaj stratoj, ktp.

(Komento post la konstruado)

La granda kaj longa konstruado sukcese finiĝis je la fiksita tago, la 10an de junio. Kaj ekde la 11a, multaj aŭtoj transiris la novan ponton same kiel kutimaj tagoj. Mi (NAMBA) ankaŭ veturis sur la ponto per mia aŭto je la 17a de junio. Jen, la ponto vere anstataŭiĝis al la nova, kaj iomete larĝa aĵo! Mi dankas al multaj anoj kiuj kontribuis al tiu granda laboro.



CC0 el [https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Kosoku_daishi_bridge_20200106\(02\).jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Kosoku_daishi_bridge_20200106(02).jpg)

ĉina legendo

Infano tenanta en la manoj florvazon senfloran

[memore al nia bedaŭrata leganto s-ro Ji Yin'geng en ŝanhajo, Ĉinio]

rerakontis Ji Yin'geng

Longe longe antaŭe estis saĝa reĝo, sub kies gvido la lando estis prospera kaj la popolo vivis

en paco. En sia maljuneco al li mankis nenio, sed, bedaŭrinde, li ne havis filon nek filinon. Iutage

li pensis: “Mi selektu plej honestan infanon en la tuta lando kiel mian infanon.” Li preparigis multe da florsemoj kaj diris al sia subulo por ke li disdonu la florsemojn al ĉiuj infanoj en la tuta lando, al ĉiu po unu, kaj diru al ili, ke tiu, kiu elkultivos plej belan floran el la ricevita florsemo, fariĝos la filo aŭ filino de la reĝo. “Ĉiuj infanoj enterigis la ricevitan florsemon en sia florzono kaj akvumis ĉiutage. Ankaŭ YAO Qiang atente prizorgis sian florsemon. Bedaŭrinde, pasis dek tagoj, pasis dek kvin tagoj, pasis monato, sed la florsemo en la tero neniam ĝermis. “Strange!” li pensis kaj ne sciis kial. Finfine li iris demandi sian patrinon: “Panjo, kial mia florsemo ne ĝermis?” La patrino ankaŭ ĉagreniĝis pri la afero kaj elbuzigis: “Ŝanĝu la florzono kaj la teron en ĝi kaj provu enterigi refoje.” YAO Qiang ŝanĝis la florzono kaj la teron en la florzono kaj enterigis la florsemon denove kiel lia patrino diris, sed la florsemo ankoraŭ kiel antaŭe ĉiam kuŝis en la florzono kaj neniam ĝermis.

Venis la tago kiam la reĝo rigardu la florojn. Multe kaj multe da infanoj de la tuta lando alvenis al la ĉefurbo kaj viciĝis ĉe strato apud la reĝa palaco kaj atendis, por ke la reĝo rigardu la freŝajn florojn. Ili ĉiuj portas belegajn vestojn kaj en la manoj tenas florzono, en kiu freŝa floro pompe disvolviĝis. Ĉiuj volas fariĝi la filo aŭ filino de la reĝo kaj heredi la tronon. Sed kial?

Kial la reĝo, rigardante la florojn, preterpasas la infanojn unu post la alia kaj surprizige aspektas malĝoja?

Abrupte la reĝo vidis ke YAO Qiang je la vosto de la vico tenas en la manoj florzono sen-floran. La reĝo ordonis sian sekvanton, por ke li venigu YAO Qiang. Kiam YAO Qiang alvenis, la reĝo demandis: “Kial vi tenas en la manoj la florzono sen floro?” YAO Qiang rakontis al la reĝo kiel li enterigis la florsemon, sed, bedaŭrinde, ne scias kial la florsemo neniam ĝermis, eble oni punos lin, ke li ŝtele ŝiris pomon sur la pomujo de najbaro iufoje. Aŭdinte, la reĝo, preninte al li la manon, ĝoje diris: “Vi estas mia honesta filo.” Sur la strato tuj ekbolis tumulto. “Kial la reĝo rigardas la infanon tenantan en la manoj florzono sen floro kiel sian filon?” oni flustradis.

La reĝo eksplikis al la ĉeestantoj: “Miaj patrolandanoj, la florsemoj, kiujn mi disdonis al la infanoj, estis sufiĉe kuiritaj.” Ĉiuj do jese balancis la kapon. Tiuj infanoj, kiuj tenis en la manoj florzono kun freŝa floro, ruĝiĝis de honto, ĉar iliaj freŝfloroj ĉiuj estis kultivitaj de aliaj florsemoj. Ekvidinte tion, la reĝo sincere diris: “Infanoj, erari ne estas grave, grave estas memscie korekti la eraron. Mi esperus, ke vi ĉiuj fariĝos honestaj infanoj.”

Ree ĉiuj ĉeestantoj jese balancis la kapon.

sezonvorto julia

Ventosonorileto

Okita Kazumi



Dumsomere japanoj kutimas pendigi ĝin sub la markezo de antaŭtagmento tiel, ke vento tintigas ĝin. Tiu ĉi rekvizito ne nur forgesigas al ni someran varmegon sed ankaŭ donas pacon de la animo al ni. La sonorileto eligas altfrekvencan sonon ekzistantan en la natura mondo kiel flustradoj de riveroj kaj pepoj de birdetoj, kaj tial ĝia sono trankviligas nin.

En Ĉinio la ventosonorileto estis uzita kiel la ilo por diveni sorton per direkto kaj sonkoloro de vento per ĝia pendigo en bambuaro, en la pasinta tempo. La ventosonorilo kiu iam venis el Ĉinio kune kun ĝia budhisma arkitekturo unue estis pendigita por ekzorci demonon, sed dum longaj jaroj iam ŝanĝiĝis en vivobjekton por komforte pasigi varmegan someron.

Jutubo pri ventosonoriletoj kaj ties sono →

